

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

Jen floras sola, forlasita la lasta rozo  
de l' somero,  
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte  
kuŝas jam sur tero.  
Ne estas ia flor' parenca, nek roz-  
burgono en proksimo,  
Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la so-  
pirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene  
sur trunketo brili;  
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru,  
dormu vi kun ili!  
Foliojn viajn mi afable disĵetas sur  
bedeto jena:  
Vi kuŝu apud senaroma, malviva ku-  
nular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' ami-  
keco flor' fidela,  
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos  
lasta ŝton' juvela.  
Ĉar kiam velkis veraĵ koroj, sente-  
maj flugis for el rondo,  
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en  
malvarma mondo?

...

Thomas Moore,  
La lasta rozo

*tradukita de Clarence  
Bicknell*

Jen la lasta rozeto de fora  
somer'!  
Ĝiaj belaj kunuloj jam  
velkis sur ter'!  
Ne restas parenco, ne unu  
rozflor'  
Partoprenas komplete en  
ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tut-  
sola, ho roz'.  
Iru dormi kun ili en paca  
ripoz'.  
Nun viajn petalojn  
disĵetas mi for  
Al viaj kunuloj sen viv',  
sen odor'.

Tiel same volonte formor-  
tus mi mem,  
Se ne plu min atendus  
amika manprem'.  
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi  
mond'  
Volus loĝi izola sen amo-  
respond'?

...

Thomas Moore,  
La lasta rozo de so-  
mero

*tradukita de N. N. 101*

Nun floras de l'somero la sola  
lasta rozo.  
La kunvivantoj ĝiaj velkis en  
mortripoz:  
ne estas flor' parenca, aŭ roz-  
burgono ia,  
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn redo-  
ni al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la  
tronket' plendeti  
Ĉar la beluloj dormas, vi devas  
kundormeti.  
En morto, sen parfumo,  
l'amikoj jam dormetas:  
Do floron vian teren ĝentile mi  
disĵetas.

Mi tiel volus sekvi se l'amikec'  
finiĝus  
Aŭ la juveloj brilaj de  
l'amular' foriĝus:  
Ĉar se la koroj veraĵ kaj dolĉaj  
ne plu estus,  
En la dezerta mondo volonte  
kiu restus?

...

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 - †1921-07-04).*

*Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.*

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de CLARENCE BICKNELL (\*1842-10-27 - †1918-07-17).*

*Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon [http://eo.wikisource.org/wiki/AEĥtoro:Bicknell\\_C.](http://eo.wikisource.org/wiki/AEĥtoro:Bicknell_C.), \_ Bordigheza.*

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (\*1779-05-28 - †1852-02-25) en Esperanton de N. N. 101.*

*Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.*